
IPR
INTERNACIA PEDAGOGIA REVUO

Driemaandelijks tijdschrift
Afgiftekantoor: Antwerpen X. ISSN 1013-2031
Jarkolekto 34 - trimonata
04/1

Redakta Komitato:
Jozefo Németh (red.)
Katalin Kováts (vicred.)

Kunlaborantoj de la aktuala numero:
Katja Bodnarova
Katja Ignatieva
Mauro La Torre
Liu Xiaojun
Hokan Lundberg
Stefan MacGill
Rob Moerbeek
Petik János
Atilio Orellana Rojas
Radojica Petrović
Bardhyl Selimi



Boomee forpasis...

(p. 11.)

김 부 미

필명 : (희수), (오뚜기=falpupeto)

1941년 황해도 신천군 출생
해방된 이듬해 월남.
성신여중고교 졸업, 동덕여대(60-62)와
한성대학(78-80)의 국어국문학과 졸업
연세대학교 교육대학원(80-82) 중단하고 출국.
미국, 카나다를 거쳐 스웨덴에 정착(85).
국내에서 중등국어 교사로 15년간 근무했고,
스웨덴에서도 계속 13년간 교사로 근무함.

ilei
Organo de Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj

ENHAVO

Stefan MACGILL: *Plumira* 1
La Estraro kunsidis en Beogrado, La Komitato voĉdonas (A. ORELLANA ROJAS) .. 3
Katja IGNATIEVA: *Interkultura lernado kaj edukado: bezono kaj defio* 4
Forpasis BOOMEE (anstataŭ nekrologo) 11
Hokan LUNDBERG: *Flugiloj de Malfacila Vento* 13
Bardhyl SELIMI: *La distra momento dum la lecionhoro de matematiko (I-a p.)* . 15
LIU Xiaojun: *Kiel mi instruas tempojn kaj participojn al ĉinoj (I-a parto)* 24
PETIK János: *Pri la instruo de vortoparoj* 28
Katja BODNAROVA: *Ĉe la tombo de Komenio* 30
El la landoj kaj sekcioj (GB, BG, JP, TG) 31
Reago (Felix GARCIA BLAZQUEZ) 33
Konferenco 2004 – informoj, aliĝilo (Atilio ORELLANA ROJAS) 33

ESTRARO DE LA LIGO

Prezidanto: Radojica Petrović, Bul. oslobodjenja 36/14, YU-32000 Ĉaĉak, Serbio. Tel. (+381) 32 371053. Fakso: (+381 32) 342 101 <radp@ptt.yu>
Kunordigado, eksteraj rilatoj, la projekto Interkulturo

Vicprezidanto: Stefan MacGill, Pannonia u. 30. I/6, HU-1136 Budapest, Hungario. Tel. (+36 1) 349-5207, <stefan.macgill@galamb.net>
Eldonado (inkl. periodaĵojn), Int. Infana Kongreseto (komisie de UEA)

Sekretario: Atilio Orellana Rojas, Riouwstraat 172, NL-2585 HW Den Haag, Nederlando. Tel.: (+31 70) 3556677, <iei001@tiscali.nl>. *Konferencoj*

Vicsekretario: *vakas*

Estrarano pri financoj (provizora!): Ulla Luin, Myggdalsvägen 123, SE-135 42 Tyresö, Svedio. Tel (+46 8) 7128291 <ulu@algonet.se>

Estrarano: Hokan Lundberg, c/o stan Pivalica, Tadeuša Košćuška 80/18, YU-11000 Beograd, Serbio. Tel. (381 11) 188 496, <hokan@ikso.net>
Retprojektoj, junulara agado, informado

Estrarano: Mauro La Torre, Dipartimento di Scienze dell'Educazione, Università Roma Tre, Via Castro Pretorio, 20, IT-00185 Roma, Italio. Tel.: (+39) 06 44 62 092 aŭ 06 49 57 805, fakso: (+39) 06 49385673. <mauro.latorre@uniroma3.it>; http://host.uniroma3.it/docenti/latorre/
Universitata kaj scienca agadoj

Estrarano: Aleksandr Blinov, Pr. I. Jakovleva 10A-63, RU-428027 Ĉeboksari, Rusio. Tel.: (7 8352) 665 908, <delfeno@chtts.ru>
Lerneja agado, instrukapabligo, ekzamenoj

La membraron de ILEI administras (laŭstatute) la sekretario. La abonantaron de Juna amiko administras (ne pro-ofice) la estrarano pri eldonado. Bonvolu direkti mesaĝojn tiutemajn nur al la koncernato, kaj ne al la tuta estraro aŭ tra komputilaj diskut-rondoj. Dankon!

Stefan MacGill:
Plumira

Ke aperu antaŭ vi unuapaĝe en nia revuo ĉefartikolo el mia plumo kiel eble plej malofte estas mia arda deziro. Tiun plum-iran misfortunon vi suferis laste komence de 2001, kie vi povis legi, en argumentado por abolo de rotacia elekto de estraranoj: "Tiel ni povos havi koheran teamon [kiu] dum du jaroj kaj naŭ monatoj, plenkore kaj sen perturboj, interrompoj kaj malaperoj dediĉu sin al la laboro." Tia misprognoza kapablo meritas penton per sakŝtofo kaj cindroj. Iuj lernas de siaj eraroj, kaj pluiras krei novajn. Eĉ tiu nivelo de lerto eskapas min. La paso de eventoj depost tiam demonstras ke forigo de la rotacio estis por efika estraro kondiĉo necesa sed ne sufiĉa. Estu plumira vi, ke plennaive kaj refoje mi asertas, ke baldaŭ post la finredakto de ĉi tiu revuo, ni havos denove plene funkciantan estraron.

La demando starigenda: kiu bildo reprezentas la aŭtentikon – la nun baldaŭ kompleta kaj aktiva teamo, aŭ la averaĝo de la du jaroj inter Lovrano kaj Orestrando, kun spacoj, mankoj, sekvoj – meze tri aŭ kvar aktivaj estraranoj el sep. Mi volus kredi la unuan, sed timas la duan.

Unu vojo protekti nin de laborfortaj mankoj kaj estraran-krevoj, estas enretigi kaj aŭtomatigi kiom eble nian administradon, ke aktualaj statoj de registroj estu de ĉiu koncernato videblaj en unu certa storejo, tiel ke malpli da ret-mesaĝa trafiko kaj traktado necesu. La ekuzo de tuja mesaĝado kaj interaktivaj dokumentoj, kiujn teamoj povas redakti kaj kreskigi rete (vikioj) servos simile. Niaj publikaj ret-paĝoj bele evoluas kaj indas je viaj vizitoj. Sekvu la evoluigo de internaj, organizaj paĝoj.

Alia vojo por pluvivo estas certigi modestajn honorariojn por kelkaj homoj prizorgi rutinan administradon de nia membraro, libroservon, servojn al instruistoj, interkulturan kontaktadon, universitatan agadon, la ekzamenan sistemon... La eblecoj senfinas. Vidu precizan liston el tiu artikolo el 2001. Ĝi plie diris: "La suba pledado [por profesiigo] tedos tiujn el vi kun longaj memoroj. Vi jam aŭdis ĝin de mi plurfoje inter 1990 kaj 1992 … Dek jarojn poste, la neceso estas tiom pli brula." La vortoj same aktualas, nur ŝanĝu "dek" al "dek tri". La konstruata liga buĝeto

2004 enhavas eron por honorarioj; ĝi en estontaj jaroj neniam manku. Ne manku ankaŭ trejn-kursoj por trovi kaj doni la necesajn lertojn al niaj “oficantoj”.

La post-pekina UEA venu sub nian influon kaj konvinkiĝu ke necesas solida investo en la eduka infrastrukturo. Kiel daŭrigo de niaj multjaraj klopodoj (vidu la ĉef-artikolon en revuo Esperanto, majo 2001). UEA ne nur konstatu la ligon inter sia strategi-plana prioritata kampo "Instruado" kun la prioritata vertikalo "Profesiigo", sed tiru praktikajn konkludojn el tio kaj transformu tion al reala kontribuo.

La deziro de UEA subteni nur konkretajn, palpeblajn projektojn estas komprenebla – kaj bonvena. Sed de ie (ne nepre UEA rekte) la movado devas konsenti pri konstruado kaj rimedigo de instruada bazo. Nia prospero kaj progreso ne povas eterne pluiri per ŝaŭmvinbobelaj projektoj kaj iniciatoj freŝ-tigaj, prestiĝaj. Necesas prizorgi ankaŭ la radikojn — la organizan bazon. La grundo de lastatempa historio (nia kaj malnia) tapiŝtapetiĝas je forblovitaj folioj venintaj de tigpintaj projektoj mal-adekvate nutritaj el la trunko.

La manko de oficista stabeto kaj stabila bazo kaŭzas malfacilon varbi kaj reteni estraranojn, ĉar ili prave timas droni en rutinaĵojn kaj taskojn, kiujn ili ne havas tempon plenumi. Forrabite la tempo plenumi la veran taskon de estrarano: plani, iniciati, koherigi la atingojn, dokumenti siajn proce-durojn por gvidi posteulojn, malfermi novajn teritoriojn kaj avangardi.

Nu, post unu jaro vi meritos ĉi-loke seriozan prezidantan nov-jaran mesaĝon. Post tri jaroj, ni revenu al organiza bilanco – refoje mi estu plumira. Ni ĉiuj estu plumiraj. Ni miru plu, ĉu fakte ILEI havis tra la tri jaroj plene funkciantan estraron kaj aktivularon? Ĉu prosperis la projektoj; ĉu ni kaj la movado flegis la radikojn?

Sufiĉas vortoj, ekestu fortoj.

Stefan MacGill
Vic-prezidanto de ILEI

La Estraro kunsidis en Beogrado

Inter la 5-a kaj la 8-a de decembro 2003 la ILEI-Estraro kunsidis en Beogrado. Tiam estis vasta tagordo konsiderenda kaj la tempo vere malabundis por ĉio. Jen resumo de kelkaj el la punktoj traktitaj tiam.

Rilate al la ILEI-eldonaĵoj, pri IPR estis la decido ke la Redaktoro kaj Vicredaktoro estu rekonataj kiel Redakta Komitato. IPR havos ankaŭ Sciencan Komitaton por taksado de la artikoloj venintaj kiel kontribuaĵoj. Ĝi funkcios laŭeble baldaŭ. 'Juna Amiko' montris pozitivan evoluon en la jaro 2003 kaj oni komencis analizi planojn pri hibrida eldono de la revuo (reta kaj papera) ekde la jaro 2005. Estis akceptita ankaŭ la iniciato de UEA pri reeldono de la Gvidlibro de la Internaciaj Ekzamenoj de ILEI/UEA kun plibonigoj en la teksto.

Pri projektoj en kiuj ILEI kunlaboras, Hokan LUNDBERG informis pri 'Flugiloj de Malfacila Vento' kaj ĉar la temo de Interkulturo paralele kunsidis, eblis aŭdi detalan raporton de Katja IGNATIEVA pri la paŝoj antaŭen de tiu projekto kaj pri la planoj por la estonto.

La varbkampanjo progresas, aparte en Brazilo kaj Britio. ILEI efektive bezonas altigon de sia membronombro kaj en ĉi tiu kampanjo la laboro de la Sekciestroj kaj Reprezentantoj de ILEI estas aparte grava kaj bezonata.

Rilate al konferencoj, estis decidite esplori la eblecon konferenci en Litovio en la jaro 2005 kaj en Italio en 2006.

Analizante la trijaran laborplanon la Estraro konstatis la mankon de interna forto por kovri la kampon de Informado kaj la bezonon trovi komisiiton por tio. Tiel, do, sinproponoj de motivitaj membroj estas bonvenaj.

Pri kelkaj el la traktitaj punktoj la Estraro decidis lanĉi skriban voĉdonadon ĉe la Komitato, interalie pri la elekto de nova kasisto kaj pri nova kotizkategorio. Pri tio vi legos apartan mencion en ĉi tiu numero de IPR.

Atilio ORELLANA ROJAS, Sekretario

***

Subtenu la refortigon de nia membraro! Tenu nian Ligon internacia. Donacu al la koleghelpa kaso, por ke ni akceptu membrojn por 2004 kiuj mem ne povas pagi la kotizon. Liveru mem nomon aŭ nomojn, aŭ lasu al ni elekti el la dezirantoj. Pri manieroj donaci, legu sur la tria kovrilpaĝo!

La Komitato voĉdonas

Sekve de la frua forpaso de S-ino Boo Mee KIM-LINDBLOM, elektita por respondeci pri Financoj en Örestrand okaze de la pasintjara ILEI-Konferenco, la Ligo restis sen Kasisto. La Estraro decidis provizore nomi S-inon Ulla LUIN el Svedio, nuntempe membro de la Kaskontrola Komisiono, por agi en tiu posteno ĝis la efektiva ekdeĵoro de nova posteulo de Boo Mee KIM-LINDBLOM. Estis necese, do, ke la Komitato konfirmu tiun decidon. Ĉar intertempe estis trovita kandidato, estis bezonate okazigi voĉdonadon por povi enpostenigi tiun. Kadre de sia decembra kunsido la Estraro decidis proponi al la Komitato, sekve de la rekomendoj faritaj dum la Konferenco en Örestrand, ke ILEI ne enkonduku novan ***membrokategorion***, sed novan ***kotizkategorion***. Tiel, do, estu mildigita kotizo por membroj, kiuj ricevas la revuon rete. La propono estas jam valida ekde la 1-a de januaro 2004. La valoro de tiuj kotizoj estas EUR 4,00 por loĝantoj A-landoj kaj EUR 2,00 por loĝantoj en B-landoj. La PDF-formata revuo estas disponebla en la ILEI-hejmpaĝo. La Sekretario disponigos kaŝvorton por membroj en tiu kotizkategorio por povi elŝuti ĝin. Kolektado de kotizoj por tiu kategorio estas tasko de la Sekciestroj. La nova kategorio donos al la membroj ĉiujn rajtojn kiel plenrajta membro de la Ligo, do, la Sekcioj rajtos kalkuli je komitatanoj surbaze de la nombro de ĉi tiu nova kotizkategorio. Ĉar konforme al la art. 7.2.7 de la Statuto, 'la Estraro rajtas okazigi skribajn voĉdonojn de la komitatanoj', la Estraro invitis la membrojn de la Komitato al poŝta voĉdonado pri ĉi tiuj tri punktoj. Nun, kiam vi legas ĉi tiun numeron de IPR, la voĉoj estas kalkulataj. La rezulton vi konos en nia sekva numero.

Atilio ORELLANA ROJAS, Sekretario

Katja Ignatieva:
Interkultura lernado kaj edukado: *bezono kaj defio*

Kial interkultura lernado?

Mikso de popoloj, kredoj, religioj, tradicioj kaj vivstiloj – tiel aspektas la moderna mondo. Ĝi estas granda migrejo, en kiu unuopaj homoj kaj grupoj translokiĝas inter landoj kaj kontinentoj allogitaj per perspektivoj

trovi laboron aŭ eki studojn, kuniĝante kun sia partnero aŭ elmigrante la regionojn de militaj konfliktoj.

Moderna mondo estas sub influo de kelkaj gravaj procesoj. De unu flanko pli kaj pli evidentaj iĝas tutmondiĝo kaj globaliĝo: interreto kaj satelita televido provizas al homoj aliron al samaj informoj, reklamas samajn varojn kaj en tiu maniero kreas iusencan ligon, "samecon" inter loĝantoj el la plej diversaj mondopartoj. De alia flanko migrado rezultiĝas en tio, ke modernaj socioj iĝas pli kaj pli nehomogenaj. "Unu-kulturaj" socioj iĝas fenomeno de la "hieraŭa tago". Moderna mondo estas mondo de "multkultura" socio, mondo de diverseco kaj bunteco. La supre menciitaj procesoj ambaŭ rezultiĝas en unu sama situacio: homoj estas devigataj eliri el la kadro de sia propra kulturo kaj kontakti aliajn.

Oni ne plu povas ignori diversecon de kulturoj kaj homoj ĉirkaŭ si, oni ne plu povas eviti kontaktojn kun aliuloj. Sed ĉu oni estas pretaj al tiuj kontaktoj? Ĉu oni povas instali rilatojn kun homoj de fremda kulturo sur bazo de egaleco kaj respekto, meti flanken antaŭjuĝojn kaj stereotipojn kaj havi kun aliuloj malferman dialogon? La nuntempa realeco montras, ke la plej ofta respondo estas "NE".

Sekve unu el la taskoj de la hodiaŭa mondo estas trakti diferencojn kaj eduki homojn al kunvivado kaj kunekzistado en novaj kondiĉoj: kaj ĝuste tie sur "scenejon" eliras la nocioj de "interkulturo" (IK) kaj "interkultura lernado kaj edukado" (IK-lernado kaj edukado).

Interkulturo, kulturo, interkultura lernado kaj edukado
IK-lernado estas longdaŭra kaj komplika proceso, kiu temas tute ne nur pri lernado de ĝustaj ritoj de manĝado en alia kulturo aŭ maniero festi Novan Jaron en iu alia lando. Ĝi strebas helpi al homoj pli profunde esplori sin mem kaj sian manieron rilati al la mondo, malfermi sin al ŝanĝoj kaj kontaktoj kun aliaj, eduki al toleremo.
Antaŭ ol paroli pri intekultura lernado kaj edukado, ni analizu unuopajn komponentojn de tiuj nocioj, nome "kulturo", "lernado" kaj "edukado".

Kulturo
Unu el la centraj nocioj en IK-lernado estas **kulturo**. Ĉiuj ideoj pri IK-lernado estas konstruitaj sur eksplicita aŭ implicita ideo de kulturo.

Kulturo estas rigardata kiel homa produkto, iusenca “programaro”, kiun homoj uzas en la ĉiutaga vivo. Oni kutime priskribas**,** ke **kulturo** temas pri **“**bazaj hipotezoj, valoroj kaj normoj posedataj de individuoj”**.**

Necesas atentigi, ke parolante pri “kulturo” oni fakte celas interagon de kulturoj. Multaj aŭtoroj jam venis al la konkludo, ke se ne ekzistus pli ol unu kulturo, neniam aperus mem la nocio. Diferencoj inter homoj: en ilia**j** konduto, agoj kaj kredoj – jen kio konsciigas nin pri kulturo. Sekve, kulturo ne estas simple “kulturo”, ĝi estas “kulturoj”. Por ligi “kulturon” al “interkulturo”, t.e. interago de diversaj kulturoj, ni analizu unu el la multnombraj kulturteorioj, nome la t.n. “glacimonton”.

“Glacimonta teorio”
La ĉefa ideo de tiu modelo estas prezenti kulturon kiel glacimonton: nur tre eta parto de la tuta glacimonto videblas super la akvo. Sed subakve troviĝas la multe pli granda parto, kiu ne estas videbla, sed malgraŭ tio estas la vera bazo de kulturo. [*rig. Bildo 1*]

Kulturo, do, enhavas kelkajn videblajn erojn kiel ekz. arto, muziko, lingvo ktp, sed oni malfacile malkovras erojn de la vera bazo: historion de certa kultura grupo, ĝiajn normojn, bazajn imagojn pri spaco, naturo, tempo ktp.

Laŭ la glacimonta modelo la videblaj eroj de kulturo estas nur manifesto de la nevideblaj partoj. Krome tiu modelo montras, kiom malfacilas foje kompreni personojn kun malsamaj kulturaj fonoj – ni povas vidi la suprajn partojn de ilia “glacimonto”, sed ne vidas, sur kiu bazo ili sin apogas. Dum kontaktoj inter diversaj kulturoj, similaĵoj kiujn ni povas trovi havas sub si tute malsamajn bazojn kaj imagojn pri realeco.

Proceso de IK-lernado celas atingi la subakvan parton, trovi la respondon ne nur al la demando “Kio, kiel kaj kiumaniere?”, sed ankaŭ al la demando “Kial ĝuste tiel?”.

Lernado kaj Edukado
La vortaro “The Oxford Advanced Learner’s of Current English dictionary” donas jenan difinon de **lernado** (en traduko el la angla): “akiro de konoj aŭ scipovoj pri io per studado, praktiko aŭ instruado”.

Bildo 1. Glacimonta teorio de kulturo



Edukado estas proceso firme ligita al lernado kaj per ĝi ni ĉi-tie subkomprenas "proceson de transdono de konoj kaj scipovoj". Se ni aldonas al tiuj du terminoj la vorton "interkultura" iĝas klare, ke en nia kazo necesas paroli pri akiro de "interkulturaj" konoj, kapabloj kaj scipovoj. Sed kiuj estas tiuj konoj? Kiel kaj kie oni povas utiligi ilin?

Celoj de interkultura lernado kaj edukado

Interkulturaj konoj kaj scipovoj estas utiligitaj en proceso de interago de diversaj kulturoj. Partoprenante en tiu ĉi interago "interkulture" kompetenta persono sukcesas konstrui komunikadon je bazo de egaleco kaj

respekto kaj kapablas adapti sian kondutmanieron laŭ la postuloj de la aktuala situacio. Per **interkulturaj konoj** ni antaŭ ĉio celas aktivan respekton de diferencoj, malfermecon kaj pretecon ŝanĝiĝi, kapablon profunde analizi sin mem, aliajn homojn kaj kulturajn ĉirkaŭaĵojn, aktivan toleremon, rekonon de ĉiuj ekzistantaj kulturoj, malakcepton de diskriminacio kaj kapablon ĝuste taksi la komuniksituacion kaj elekti el la vico de pluraj eblaj kondutalternativoj la solan taŭgan por la momento.

La nocio **interkultura lernado** povas esti interpretita je kelkaj niveloj. Laŭvorta interpreto de IK-lernado subkomprenas individuan proceson de akiro de konoj, starpunktoj aŭ konduto rilataj al interago de diversaj kulturoj. Tre ofte tamen IK-lernado estas interpretata pli larĝe kaj priskribas koncepton de socio en kiu homoj kun malsamaj fonoj povas pace kunvivi kaj la proceson bezonatan por krei tian socion.
Komunikado inter personoj de du malsamaj kulturoj povas sentiĝi paradoksa: necesas akcepti ke alia persono samtempe estas egala al vi kaj de vi malsimila. En tiu kunteksto laŭ Ouellet (1991) la ĉefaj **celoj** de IK-lernado estas antaŭenigi kaj evoluigi:
– kapablon pli bone kompreni diversajn kulturojn en la moderna socio;
– pli fortan komunikkapablon inter reprezentantoj de diversaj kulturoj;
– flekseblecon en la kunteksto de kultura diverseco en socio;
– pli bonan kapablon partopreni en sociaj interagoj kaj rekonon de komuna heredaĵo de la homaro.
Mallonge dirite, la ĉefa celo de IK-edukado estas antaŭenigi kaj evoluigi la kapablojn de la lernantoj interagi kaj komuniki kun la ĉirkaŭa mondo.

Pedagogio de interkultura lernado kaj edukado
Kiuj estas la celgrupo de IK-lernado kaj edukado? La nuna situacio postulas certan interkulturan kompetentecon de ĉiuj, sendepende de la aĝo, socia pozicio aŭ nacieco. Sed unu el la grupoj, plej malferma al la proceso de IK-lernado estas junuloj. Ilia vivo estas plena je okazaĵoj kaj ŝanĝoj, risko kaj scivolemo. Kaj eĉ se iliaj vivkondiĉoj ne ĉiam provizas taŭgan kadron por la longdaŭra kaj malfacila proceso de IK-lernado, ĝuste ili estas la plej malfermaj al interkonatiĝo kun novaj homoj, al malkovro kaj esploro de la diverseco.

Sendepende de tio, ĉu la proceso de IK-lernado kaj edukado okazos en formala lernomedio aŭ ne, ĝi havos du specifajn rolojn: tiujn de la IK –

gvidanto kaj de la IK-lernanto. Sed male al la situacio en formala eduksistemo, interkultura lernado povas kaj devas funkcii en ambaŭ direktoj: ja homoj interagante konstante (eĉ se ne ĉiam konsciante pri tio) lernas unu de la alia. Malfermiĝo al reciproka lernado estas unu el la defioj, kiun devas alfronti ĉiuj, kiuj iĝas envolvitaj en IK-lernadon kaj edukadon. La gvidanto en tiu situacio estas ne nur instruisto, sed ankaŭ mem partoprenanto de la proceso, kaj lia/ŝia personeco kaj kondutmaniero povas forte influi la ĉi-lastan. La rolo de la gvidanto estas plani la proceson, elekti adekvatajn por tio metodojn kaj helpi al la grupo havi liberan diskuton en la plej eble interesa kaj produktiva maniero.

Por ke la proceso de IK-lernado estu sukcesa kaj fruktodona, la IK-gvidanto devas certigi ke estas plenumitaj jenaj kondiĉoj:

- Fido kaj respekto

Nur la etoso de reciproka fido kaj respekto ebligos al ĉiuj aŭskulti la alian kiel egalulon, plifortigos ĉies certecon pri si mem kaj ebligos al la partoprenantoj interŝanĝi diversajn vidpunktojn, perceptojn kaj sentojn. Tio signifas, ke necesas doni al ĉiu eblecon esprimi sin, ke necesas alte taksi ĉies spertojn, talentojn kaj kontribuojn kaj atenti pri ĉies bezonoj kaj atendoj.

- Dialogo kun alia

IK-lernado metas "alian" en la centron de interkompreniĝo kaj donas ŝancon enviviĝi en la perspektivon de alia, meti sin en la lokon de aliulo. Tiu proceso komenciĝas de dialogo, sed iras kelkajn paŝojn plu. Estas defie percepti sin mem malsimila de alia persono, sed samtempe kompreni ke tiu malsameco kontribuas al tio, kiaj ni estas kaj niaj malsamaj estadoj kompletigas unu la alian.

- Plena engaĝiĝo

Interkultura lernado postulas intensan envolvon de ĉiuj sentoj kaj ĉiuj niveloj de lernado: konoj, emocioj kaj konduto. Ĝi estigas multe da sentoj kaj apartigas ilin de nia "racio", t.e. tio, kion ni jam scias aŭ ekscios en estonto. Por partopreni en la proceso de IK-lernado oni estu malfermaj al ĉiuj novaj informoj, engaĝitaj kaj pretaj ŝanĝiĝi.

- Kono de si mem

Por IK-edukanto estas esence grave konscii pri propra kulturo kaj kompreni mekanismojn de siaj antaŭjuĝoj, kredoj, moralaj principoj kaj

valoroj. Evoluigante la aspektojn de interkultura edukado oni riskas (eĉ senkonscie) agi subjektive kaj facile trafi al jenaj evitindaj "kaptiloj":

1) redukti la kulturan realecon de lernantoj al rapidaj ĝeneraligoj;
2) interpreti ĉiujn konfliktojn nur el la kultura vidpunkto, forgesante pri psikologiaj kaj sociaj faktoroj, kiuj povas kaŭzi certan konduton;
3) provi solvi ĉiujn malfacilaĵojn nur surbaze de racie akiritaj konoj.

Resumo

Kondiĉoj de multkultura mondo postulas de homoj envolviĝi en interagon de diversaj kulturoj kaj akiri "interkulturan" kompetentecon. Interkultura lernado estas defia proceso, kiu envolvas profunde enradikiĝintajn ideojn kaj imagojn pri la mondo. Por partopreni ĝin kaj povi kompreni la aliajn, oni devas antaŭ ĉio havi profundan konon de si mem kaj de la propra medio. Dum proceso de IK-lernado oni ekas pridubi tion, kion individuo opinias normala kaj enda plu havi. Interkultura lernado estas defio al la propra identeco – sed samtempe ĝi povas iĝi vivstilo kaj maniero pliriĉigi sian identecon. La celoj de IK-lernado estas lerni vivi en la mondo de diverseco kaj adekvate komuniki kun tiu ĉi mondo surbaze de aktiva respekto, toleremo kaj malakcepto de diskriminacio. IK-lernado estas lernoproceso kiu plej efikas en kondiĉoj kiujn provizas neformala eduksistemo, t.e. kie ambaŭ flankoj: gvidanto kaj lernantoj estas plenrajtaj partoprenantoj de la proceso kaj la tutan tempon lernas unu de la alia. Agante kiel IK-edukanto oni devas nepre memori pri principoj de ĉiuflanka fido, respekto kaj plena engaĝiĝo. La rolo de gvidanto estas organizi lernoproceson kiu donos al la grupo eblecon havi liberan diskuton en la plej eble interesa kaj produktiva maniero kaj kiu helpos al la partoprenantoj akiri interkulturajn konojn.



Katja Ignatieva, <katja@tejo.org>

Laŭ la materialoj de T-kit "Intercultural learning", Council of Europe, 2001.

Surfote: la aŭtorino dum la Beograda Estrarkunsido de ILEI.
Fotis: Mauro la Torre.

FORPASIS BOOMEE

Anstataŭ nekrologo



Ni memoras ŝin el la lastaj UK kaj ILEI-konferenco ĉiam laboranta kaj zorganta pri multaj taskoj kaj aranĝoj. Tial ni ne miris pri spuroj de laco ĉe ŝi, ĉar tioma laboro ja estis laciga, sed ni ĉiam esperis kaj trovis amikan rideton sur ŝia vizaĝo kaj agrablan etoson en ŝia ĉeesto. En la tria semajno poste Boomee sendis al siaj kolegoj en la Estraro de ILEI retmesaĝon kiu klarigis alimaniere ŝian lacon.

Karaj,

Pardonon pro mia malagrabla novaĵo.

En la 21 de aŭgusto komenciĝis aŭtuna semestro, kaj posttagmeze mi devis viziti malsanulejon jam longe atenditan. Tie mi tuj kaptiĝis kaj ekzamenoj daŭris dum kelkaj tagoj. […] Morgaŭ matene unu kuracisto-grupo havos specialan renkontiĝon por trakti la kazon, poste mi scios pri iom da detaloj. Mi estas daŭre en hospitalo, sed momente mi ricevis permeson viziti hejmon, kaj mi kaptas ŝancon informi al vi la situacion.

Mi jam intencis mallongigi mian labor-procenton (25%) ne sciinte pri la nuna stato. Verŝajne mi estos malsanlibera senlime laŭ nuna stato.

- Mi jam finfaris raporton pri mia projekto de la infanoj,

- KF-ajn rezultojn mi jam sendis al vi ĉiuj, kaj

- mi intencis raporti pri Antaŭkongreso 2 kaj P2 al UEA, sed ankoraŭ ne venis du fakturoj. Mi baldaŭ finos la raporton.

- Ankaŭ pri IK2 mi intencas fin-raporti, tamen mankas io, aŭ daŭre necesas pliaj informoj, kiujn ni devas trakti. Rade, Hokan kaj Sonja, bv. informi pri necesaĵoj por ke mi povu fintrakti la aferon.

- Mi daŭre devas reordigi kaj korekti financan raporton de 2002, krome laŭ mia promeso mi devas reordigi nebonan ĝisnunan sistemon koncerne de la laboro.

Ĉi tiuj estas miaj absolute farendaĵoj kaj mi klopodos plenumi ilin. Tamen mi ne scias kiom da tempo restas por la laboro aŭ por mia vivo. Laŭ la eblo mi tenos kontakton kun vi. Ĝis!

Boomee

Kaj le restinta tempo por la laboro kaj ŝia vivo daŭris ĝis la 9-a de novembro 2003. Ŝoko kaj tristo. La 5-an de decembro komenciĝis estrarkunsido en Beogrado, sen Boomee. Pense ni estis kun ŝi ĉe la entombiga ceremonio en Stokholmo, kiu okazis tiun tagon.

Okaze de la 60-jariĝo



En la jaro 2001 Boomee Kim-Lindblom fariĝis 60-jara. Ĉar en Koreio la 60-jariĝo estas grava festotago, la dua en la vico: la 1-a – naskiĝo, la 2-a – 60-jariĝo, la 3-a – geedziĝo ktp., ŝi resumis sian 60-jaran vivon libroforme. Tio fariĝis dulingva kolekto de ŝiaj eseoj publikigitaj en diversaj literaturaj gazetoj en Koreio, Usono, Kanado, malmultaj en Svedio. Ŝi recenzas E-verkojn kaj skribas pri sia E-vivo kaj vojaĝoj tra Esperanto-lando. Legante la libron oni komprenas pli bone Boomee kian ni memoras: karmiena kaj bonkora, diligenta, respondeca kaj fidebla amiko kaj kunlaboranto, gardanto de bona humoro kaj kunlaboretoso.

Ŝi dormu en paco.



Jen sekvu unu el ŝiaj eseoj:

Unueco

La Espero 1994:5-6

Estis iam juna nove bakita instruistino, kiu fariĝis populara inter lernantoj. Ŝiaj kolegoj estis iom ĵaluzaj kaj diris:
– Ŝi estas la plej juna instruistino, pro tio la lernantoj ŝatas ŝin.
Kiam ŝi fariĝis mezaĝa, ŝi daŭre estis populara, kaj la kolegoj diris:

– Tio estas, ĉar ŝi estas ne tiel juna kiel stulta junulino, nek maljuna kiel ruza vulpo.
Daŭre ŝi estis populara, kiam ŝi fariĝis pli ol 40-jara. Tiam la kolegoj diris:
– Tio estas, ĉar ŝi estas maljuna kaj la lernantoj sentas, ke ŝi prizorgas ilin kiel patrino.
Poste ŝi translokiĝis en alian landon, iu verda lando. Ankaŭ tie ŝi sukcesis. Tiam la kolegoj diris:
– Tio estas, ĉar ŝi estas eksterlandano, ŝi havas pli da ŝanco sukcesi ol enlandano.
Kiam ŝi malsukcesis, ili diris:
– Jes, kompreneble. Fariĝis tiel, ĉar ŝi estas eksterlandano.

Falpupeto

Nova ILEI-projekto por subteni la E-instruadon:



“Flugiloj de Malfacila Vento”

Hodiaŭ ekzistas pluraj aferoj kiuj malfaciligas la instruadon de Esperanto, aparte al kaj fare de gejunuloj. Ekzemple:

- malalta lingvonivelo ĉe multaj junuloj,
- malmulte da junaj Esperanto-instruantoj ekzistas,
- malabundas materialo taŭga por junuloj kiuj volas lerni Esperanton,
- malestas eblecoj peti monon de eksteraj fondaĵoj por Esperanto-instruado kaj
- malfacilas trovi interesiĝantojn (almenaŭ en la okcidento) kaj instigi komencintojn daŭrigi.

Alievorte: *Ni laboras en MALfacila vento.* Tamen, la rimedoj kiuj povas helpi nin plibonigi la situacion estas pluraj: **manlibro** por instruantoj kaj organizantoj de Esperanto-kursoj, **trejnseminarioj** por instruemuloj, **novaj metodiko kaj instruiloj**, **nova ekzamensistemo** taŭga por TEJO-aranĝoj, **trinivelaj E-kursoj** dum TEJO-aranĝoj[1], **informadsubteno** kaj starigo de **kontaktreto** por junaj instruantoj. La projekto “Flugiloj de


[1] La unua trejnseminario por ĉ. 20 TEJO-aktivuloj okazos en Sarajevo lastan semajnon de marto (paralele kun trejnseminario de Interkulturo).

Malfacila Vento” (mallonge “flugiloj”) volas per tiuj rimedoj plivastigi kaj subteni instruadon de Esperanto, aparte inter junuloj.

”Komenco bona, laboro duona”

La projekto “flugiloj” havas jam bonan komencon kaj espereble pli kaj pli da homoj aliĝos al ĝi iom post iom. Jen la nuna stato:

- Pli ol 20 homoj kun spertoj pri E-instruado kunlaboras pri la projekto per la listoj *http://groups.yahoo.com/group/ilei-flugiloj/members* kaj *http://ikso.net/ilei/vikio/Flugiloj_De_ Malfacila_Vento*.
- Ni interkonsentis pri enhavo de la manlibro por instruemuloj kaj planas havi unuan, iom krudan, version preta fine de marto.
- La unua trejnseminario por ĉ. 20 TEJO-aktivuloj okazos en Sarajevo lastan semajnon de marto (paralele kun trejnseminario de Interkulturo). Ĝiaj gvidantoj estos *Birke Dockhorn* kaj *Atilio Orellana Rojas*.
- Ni planas trejnadon ankaŭ dum IJK en Rusio kaj la ILEI-konferenco en Ĉinio.



- La projektoj “*Esperanto Mobilio*” kaj “*lernu!*” montris intereson kunlabori, i.a. pri ekzamensistemo taŭga por junularaj aranĝoj kaj metodiko kiu miksas perretan kaj ĉeestan instruadon.
- TEJO kaj E@I estas partneroj de la projekto, ESF eventuale subtenos ĝin.
- Dum la *Internacia Seminario* en Germanio okazis informado kaj planado de “flugiloj”. Pluraj montris intereson pri la projekto kaj krome interŝanĝis siajn spertojn pri instrumetodoj, lernolibrojn k.s.. (La ideo estas kadre de “flugiloj” regule, dum junularaj aranĝoj, okazigi tiajn diskutrondojn pri E-instruado.)

Bonvolu skribi al mi pri vi mem kaj viaj instruspertoj se vi volas iel envolviĝi en la projekton! Iam post la ILEI-konferenco aperos en IPR unua raporto pri la projekto, espereble la vento jam tiam sentiĝos iom malpli malfacila! **J**

Hokan Lundberg, <hokan@ikso.net>

Bardhyl Selimi:

La distra momento dum la lecionhoro de matematiko

(Laborsperto, parto I.)



A) Enkonduko

Fama matematikisto, **Blezo Paskal** (Blaise Pascal) estas skribinta iam ke "**La objekto de la matematiko estas tiel serioza, ke estas utile ne preterlasi okazon por igi ĝin iom amuza".**

Plue, unu el la manieroj por plilarĝigi kaj pliprofundigi la matematikajn sciojn de la lernantoj estas ankaŭ la traktado kun ili de tiel nomataj amuzaj problemoj. Mia laborsperto en la instruado de matematiko dum 35 jaroj konvinkis min, ke la lernantoj ĝenerale, ankaŭ tiuj kun notindaj mankoj pri la matematikaj scioj aŭ indiferentaj al la matematiko, altirigas kvazaŭ magnete al preskaŭ ĉiu matematika problemo amuz-karaktera. Kial do?

Unue, mi pensas ke tiaj problemoj ne postulas la posedon kaj aplikon de specifaj formuloj kaj malfacilaj rigoraj matematikaj teorioj, sed nur iom da logiko, kiun ĉiuj lernantoj ja posedas, kaj eble simplajn sciojn akiritajn jam en la elementa lernejo, kie ili sin sentis pli certaj. Same, tiaj problemoj estas kutime rekte praktike aplikeblaj, do prezentas intereson por la ĉiutaga vivo.

Aliflanke, estas tre valore por la instruisto trakti tiajn problemojn, ĉar tiamaniere li povas pluinstigi la intereson de lernantoj al matematiko kaj eduki ilin per la matematika rezonado. La amuzaj paŭzoj dum matematika lecionhoro similas al la kaf-paŭzoj dum la longaj sciencaj konferencoj, tiom necesaj por teni alte la atenton kaj intereson de la partoprenantoj.
Krome, la tiel nomataj amuzaj problemoj ilustras kaj plifortigas la sciojn instruatajn en la klaso.

Ekzemple, ni prenu la formulojn kiujn preskaŭ ĉiuj scias:

$(a + b)^2 = a^2 + 2ab + b^2$ kaj **$a^2 - b^2 = (a + b)(a - b)$.**

Komence por multaj lernantoj estas malfacile parkerigi tiajn identaĵojn. Sed kiam la instruisto proponas al ili amuzan problemon postulantan ĝian aplikon, la formuloj ne povas plu forgesati.

Jen problemo traktita de mi kiam mi instruis la notindajn algebrajn identaĵojn:

Oni rakontas ke la rusa oficiro kaj granda poeto Lermontov estis samtempe amanto de algebro. Iam, troviĝante kune kun sia taĉmento lokita ie profunde en Siberio, iun frostan tagon, en la izbo (kabano) de oficiroj, li proponis al la kolegoj la jenan ludon: „Pripensu", li diris, „nombron (sed tenu tiun kaŝita), multipliku ĝin per ĝi mem, subtrahu el ĝi ties kvaroblon kaj poste aldonu kvar. Se vi dirus nun al mi nur la lastan rezulton, mi pretas diveni kiun nombron vi ja estas pensinta je la komenco!"

Kompreneble Lermontov aplikis ĉi-kaze la konatan identaĵon $(x-2)^2 = x^2 - 4x + 4$. La rezulto estas ĉiam plena kvadrato, ekz. 25. Lermontov trovis la duan radikon de 25 kaj aldonas al ĝi du: Rezultas 5+2 = 7. Tial li anoncas: „La nombro elektita de vi estas 7". La aliaj oficiroj surpriziĝis pro tiu "lerteco" ŝajnanta kvazaŭ ia magiaĵo fare de la juna oficiro. Pripensu kion postulus Lermontov, se li uzas la egalaĵon $(x-3)^2 = x^2-6x+9$.

Alia problemo traktita samloke jenas: Kiel oni povas multipliki parkere tiajn duopojn de nombroj kiel 103 kaj 97; 89 kaj 91, k.s.?

Oni povas rimarki ke ili povas skribati respektive (100 +3) kaj (100 -3) kaj (90 –1) kaj (90 +1).

Tiam $103*97 = 100^2 - 3^2 = 10\,000 - 9 = 9991$, respektive $90^2 - 1^2 = 8099$.

Samtiel, oni povas multipliki kun ĝi mem parkere la nombrojn finiĝantaj per kvin, ekz. 95^2: (9*10*100+25= 9025); 105^2 =10*11*100+25=11025 k.s. Faru vi la samon en lernohoro, poste klarigu la sekreton kiun vi uzas por solvi la problemon kaj vi nepre konstatos, ke ĉiuj gelernantoj parkerigos senprobleme la egalaĵojn kiujn vi prezentos al ili.

B) Klasifiko de la amuzaj problemoj

La amuzaj problemoj povas esti klasifikitaj ekzemple tiel:

- Historiaj problemoj
- Logikaj problemoj
- Praktikaj problemoj
- Aplikaj problemoj
- Matematikaj enigmoj
- Matematikaj sofismoj
- Matematikaj ludoj
- Matematikaj andekdotoj
- Aliaj.

(Daŭrigo sur p. 20. →)

ILEI-organigramo

Plurfoje, oni demandis al mi klarigi: Kion faras ILEI – Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj? – Kiamiere klarigi la agon, la celon kaj la rilaton kun UEA – Universala Esperanto-Asocio?

Malfacile per simpla skribaĵo, per simpla vortumado. Tiel venis al mi la ideo post legado koncerne la raporton pri la konferenco en Örestrand de la nuna ILEI-Prezidanto en IPR-n°03/3, verki folion en formato A4 por koncentrigi plurdirekte la prizorgadon kaj la celojn kunlaborantajn kun ILEI.

Tiamaniere, mi resumis per malsamaj geometriaj formoj la agojn kaj la kunlaborojn en tiu organigramo. Ĝi faciligos la prezenton de ILEI ĉiucirkonstance dum staĝo, seminario, konferenco, aliaj diskutoj al novaj kaj malnovaj esperantistaj instruistoj/kursgvidantoj.

La aspekto de la organigramo montras en unudirekta indikilo la prizorgojn kaj en dudirekta indikilo la kunlaborojn. Mi konsultis la ILEI-Prezidanton pri tiu solvo.
Mi deziras al ĉiuj plej bonan uzon, por plej bona disvastigo kaj plej bona instruado de esperanto.

J. CATIL, franca sekciestro de ILEI

1. Historiaj Problemoj

Ĉi tie temas pri multaj famiĝintaj problemoj de diversaj epokoj, inkluzive Mezepokon, kiuj samkiel la proverboj, fabeloj k.s. konsistigas la trezoron de la popola kulturo.

Ekzemploj: Ĉe la ĉapitro "La Ekvacio de la unua grado kun unu variablo" mi traktis la jenan problemon:

1.1. La Tombo de Diofanto

Sur la ŝtonplato de la tombo de Diofanto estas skribite: “Ho, vi hazarda piediranto, se vi volas ekscii kiom da jaroj mi vivis, sciu ke mia infanaĝo okupis 1/6 de la vivo, dum la junuleco 1/12; post kiam pasis 1/7 de la vivo mi edziĝis kaj post kvin jaroj mi fariĝis patro kun filo, sed malbonŝance filo mia mortis kiam mi atingis la duonon de mia vivoaĝo. Poste mi min okupis per matematiko pliajn kvar jarojn por min konsoli, ĝis mi fine mortis.”

Solvo: Se ni notas per x la vivoaĝon de Diofanto ni povas kompili la ekvacion:

$$x = \frac{1}{6}x + \frac{1}{12}x + \frac{1}{7}x + 5 + \frac{1}{2}x + 4.$$ La rezulto estas x = 84

Ĉe la ĉapitro “Ripetado de la scioj el la elementa lernejo” mi estas traktinta la jenan problemon:

1.2. La kameloj de arabo

Iu arabo antaŭ ol morti postlasis kiel heredaĵon al siaj tri filoj 17 kamelojn kondiĉe ke la plej aĝa el la filoj ricevu la duonon de ili, la mezaĝa la trionon kaj la plej juna – la naŭonon. La filoj embarasiĝis kaj petis helpon de preterpasanto, rajdanta kamelon.

Solvo: La rajdanto haltis, malsupreniĝis, aldonis sian kamelon al la hereditaj kaj al la plej aĝa filo li donis la duonon - tio estas 9, ja la kameloj iĝis 18. La trionon, t.e. 6, li donis al la mezaĝa filo kaj la naŭonon, t.e. 2, li donis al la tria filo. Entute la filoj ricevis 9 +6 + 2 = 17, kiom do la patro lasis al ili. Restis unu kamelo, sur kiu la preterpasanto ekrajdis. Fine li daŭrigis sian rajdadon.

Tiel ĉiu filo ricevis sian porcion. Sed ĉu la solvo estis prava? Kaj justa? Certe ne, ĉar ekz. 9 > 17/2. Sed por la fratoj tia solvo estis ja konvena, ĉar ĉiu el ili ricevis pli ol promesite, kaj ne estis necese buĉi iun kamelon.

Kia interrilato ekzistas inter la onoj (frakcioj)? Ilia sumo estas ĝuste 17/18 t.e. preskaŭ 1. Do estas dividita nur 17/18 de la kameloj, se ni estus dividintaj ankaŭ la reston, 1/18, ni ricevus descendajn geometriajn progresiojn senfinajn kaj la divido daŭrus senfine…
Estus interese ankaŭ proponi al la lernantoj kiel hejmotaskon la jenan problemon:

1.3. Testamento

Iu viro en la pratempa Romo havis edzinon gravedan kaj antaŭ ol morti li testamentis, ke oni dividu lian riĉaĵon jene: Se lia edzino naskus filon, oni dividu la riĉaĵon laŭ proporcio 2:1 favore al la filo; se ŝi naskus filinon, la riĉaĵon oni dividu laŭ la proporcio 1:2 favore al la edzino. La viro mortis kaj post iom da tempo lia edzino naskis du ĝemelojn, gefilojn. Kiamaniere oni devus dividi la riĉaĵon?

Solvo: Iu juristo (Julian Solvi) en la dua jarcento proponis ke la riĉaĵo dividiĝu en sep partojn: kvar ricevu la filo, du la edzino kaj unu la filino. Ĉu tiu divido estas justa? Kelkaj juristoj diris ke tia divido ege diskriminacias la filinon kaj proponis aliajn dividmanierojn.
Ĉu vi povas respondi en kazoj kiam la edzino naskus 3, 4 aŭ kvin ĝemelajn gefilojn?

2. Logikaj problemoj

2.1. La elektra seĝo

Por indulgi la tro saĝajn krimulojn, la reganto de iu el usonaj ŝtatoj estis decidinta doni al la mortkondamnitoj la jenan ŝancon:
En la ekzekutĉambro troviĝas du seĝoj, el kiuj nur unu estas vivdanĝera sed ili ŝajnas tutsimilaj deekstere. Al la kondamnito anonciĝis ke la ekzekutisto havas kutimon ke unu tagon li diras la veron kaj la sekvan tagon la malveron. La kondamnito rajtas fari nur unu demandon al la ekzekutisto kaj se surbaze de la respondo li divenas la nedanĝeran seĝon kaj sidas sur ĝi, li savas sian vivon. Do kiun demandon la kondamnito devas adresi al sia ekzekutisto, por ke li savu sian vivon?

Solvo: Se mi demandus vin hieraŭ, kiu seĝo estas la vivdanĝera, kiel vi respondus al mi?
Kompreneble, la kondamnito devas elekti la alian seĝon ol tiun montritan de la ekzekutisto. Kial? Ĉar, ni supozu ke hodiaŭ la ekzekutisto diras la veron, do hieraŭ li dirus la malveron, sekve li montros la vivdanĝeran

seĝon al la kondamnito, dirante: Tiu estas la nevivdanĝera. Ĉar se li montrus la neelektran seĝon, tio estus vero. Se hodiaŭ li diras la malveron, do hieraŭ li dirus la veron, do, li denove montros la vivdanĝeran seĝon al la kondamnito. En ambaŭ okazoj la kondamnito devas sidi sur la nemontrita seĝo.

2.2. La ĝemelaj fratinoj

Sur vojkruciĝo staras du ĝemelinoj. Unu el ili donas verajn respondojn, la alia malverajn. Tie estas du vojoj: unu kondukas al urbo *A* kaj la alia al urbo *B*. Vojaĝanto deziranta aliri la urbon *A* povas demandi nur unufoje la ĝemelinojn, ĉar envere la demando multekostas (ni diru 100 eŭrojn). Kiun demandon li devas formuli por ŝpari monon?

Solvo: Se mi demandus vian fratinon – demandas li unu el ili – kiu vojo kondukus min al la urbo *A*, kio estus ŝia respondo?
Kompreneble li devas elekti la alian vojon. La rezonado similas al la problemo de la elektra seĝo.

2.3. Turisto

En la urbo *A* ĉiuj civitanoj diras la veron kaj en la urbo *B* ĉiuj civitanoj diras la malveron. Ili tutsimilas unu al la alia deekstere kaj ili vizitas regule unu la alian. Iu turisto trafas hazarde en unu el tiuj urboj, ni diru per paraŝuto. Li volas scii en kiu urbo li estas, sed la demando multekostas. Ĉu vi povas diveni, kiun demandon li devas fari por ekscii la veron?

Solvo: Li demandas kiun ajn civitanon: ĉu vi estas el tiu ĉi urbo?
Kompreneble, se la respondo estas “Jes” – tie estas la urbo *A*. Provu!

3. Praktikaj problemoj

3.1. Paro da ŝtrumpoj

En iu kesto estas 6 paroj da verdaj ŝtrumpoj, 5 paroj da ruĝaj strumpoj, 4 paroj da nigraj ŝtrumpoj. Kiom da unuopaj ŝtrumpoj mi devas preni blinde (sen elekto) de la kesto por ke mi ricevu ĝustan paron da ŝtrumpoj?

Solvo: Mi devas preni almenaŭ 4 unuopajn ŝtrumpojn, ĉar du el ili nepre estos je la sama koloro. Tiun problemon mi elektis legante ĉapitron “Probableco” en la tria grado de la mezlernejo, kiel ekzemplon de rezonado nenorma.

3.2. Divido de la panbulkoj
Dividu sep panbulkojn inter ok personoj egalmaniere farante kiom eble malplej da tranĉoj, t.e. ŝparante.

Solvo: Kvar panbulkojn mi dividos po duone, du panbulkojn po kvarone kaj unu panbulkon po okone. Tiel mi ricevas $\frac{1}{2} + \frac{1}{4} + \frac{1}{8} = \frac{7}{8}$
Tiun problemon mi prenis de ĉapitro “Ripetado de la scioj en la elementa lernejo”.

3.3. Kemia solvaĵo – traktita kiel nenorma aplikaĵo, en ĉapitro "Ekvacioj"
Kemia solvaĵo je koncentro 12 % devas malkoncentriĝi ĝis 10 %. Kiom da akvo oni devas aldoni en ĝin tiucele?

Solvo: Ni notu per *m* la mason de la solvaĵo kaj per *x* la mason de la akvo aldonenda. Tiam ni devas solvi la sekvan ekvacion:
0,10 * (m + x) = 0,12 * m, el kio rezultas x = 0,02 m/0,10 = 0,2 m.
Do ni devas aldoni akvon, kiu estas egala al kvinono de la maso de la komenca solvaĵo.

3.4. La kaprino
Vilaĝano ligis kaprinon ĉe arbo meze de la paŝtejo je cirkla formo per 10 metra ŝnuro. La herbo sufiĉas por tri tagoj. Kiome tiu vilaĝano devas plilongigi la ŝnuron por ke la kaprino formanĝu ĉiutage la saman herbokvanton?

Solvo: Kompreneble, la herbosurfacoj aspektus kiel cirklaj ringoj. Por ke ili estu egalaj devas esti plenumita la egalaĵo:
p **r² =** p **(r’ ² -r ²)** el kio rezultas: $r_1 = r\sqrt{2}$.
Simile rezultas ke $r_2 = r\sqrt{3}$ kaj ĝenerale: $r_n = r\sqrt{n+1}$.

Do la ŝnuro devas prenati respektive je la longeco r, r_1, r_2… k.s., kiel supre dirite. Tiu problemo estas traktita ene de la ĉapitro pri la surfacoj de la ebenaĵaj figuroj.
(daŭrigota)

Bardhyl Selimi, Instruisto de matematiko,
Tirana Nacia Hotelumada kaj Turisma Mezlernejo

Kiel mi instruas tempojn kaj participojn al ĉinoj

(Parto I.)

Esperanto estas internacia helpa lingvo. Ĝi estas la talenta kreaĵo de doktoro Zamenhof. Laŭ ĉinoj, E-o apartenas al la eŭropa lingvo, ĉar la literoj de E-o devenas de latina alfabeto. Kaj la gramatiko de E-o, en la plej parto, similas al la gramatikoj de plejparto da eŭropaj lingvoj. Sed por ĉinoj kiuj uzas la ĉinan lingvon, kelkaj gramatikaj aspektoj estas iom malfacile kompreneblaj, ĉar la strukturo de la ĉina lingvo diferencas de la eŭropaj lingvoj, tial kiam ni instruas E-on, ni devas fari pli multajn klarigadojn por ke ĉinaj lernantoj povu pli bone ellerni kaj uzi nian lingvon. Dum multe da instruado de E-o mi opinias ke la tempoj de verboj kaj la participoj en E-o estas pli malfacile akceptataj gramatikaĵoj por niaj lernantoj. Mi volas interŝanĝi la spertojn kun aliaj instruistoj por plibonigi nian instruadon de Esperanto.

1. Pri la tempoj

En E-o kiel en la ĉina lingvo estas substantivoj, adjektivoj, verboj... por esprimi diversajn funkciojn: koncepto, ago, karaktero..., unu vorto havas unu radikon kaj diversajn finaĵojn kaj per diversaj finaĵoj oni povas distingi la sencon de la vorto kaj uzas ilin en diversaj frazoj. Sed en la ĉinaj frazoj, vortoj ne havas diversajn finaĵojn, oni devas diferencigi la sencon de vorto per la signifo, t.e. la gramatika funkcio kaj komprenas la sencon de frazo kaj juĝas la vorton kaj scias kia vorto ĝi estas (substantivo, verbo aŭ adjektivo?). Ekzemple: laboro, labori kaj labora estas tri vortoj diferencigitaj per tri finaĵoj –o, -i, -a; sed en la ĉina lingvo laboro, labori kaj labora estas unu vorto: **gong zuo**!

En Esperanto: Mia laboro estas bona.
Mi laboras en fabriko.
Mia labora metodo (aŭ metodo de laboro) estas scienca.

Sed en la ĉina lingvo:

Wo de **gong zuo** heng hao.
Wo zai gong chang **gong zuo**.
Wo de **gong zuo** fang fa shi ke xue de.

En tiuj tri frazoj la vorto **gong zuo** estas sama vorto, nur per iliaj sencoj oni povas diferencigi kiu vorto estas substantivo (1), kiu vorto estas verbo (2), kiu vorto estas adjektivo (3). Ĉiuj ĉinaj frazoj estas samaj kiel mi citas supre.

En tiuj tri frazoj oni komprenas bone la sencon, sed oni ne scias en kiu tempo mi **gong zuo** (laboras? laboris? laboros?), ĉar ne estas tempoj en ĉinaj frazoj. Tial oni ne povas scii kiam mi **gong zuo**.

En E-o estas tempoj de verboj, sed en la ĉina lingvo estas nek diversaj formoj (konjugacio) nek tempoj. En E-o oni esprimas la tempojn en kiuj oni agas per diversaj tempoj: -is, -as, -os; tamen en la ĉina lingvo oni esprimas tempojn en kiuj oni faras ion, per diversaj adverboj, ekzemple,
se oni diras: Mi lernas Esperanton (E-e), oni devas diri: Mi nun lernas Esperanton (ĉine).
Oni diras: ĉu vi iris al kinejo? (E-e), sed oni diras: ĉu vi jam iris al kinejo? (ĉine)
Oni diras: Johano laboros en tiu fabriko (E-e), sed oni devas diri: Johano estonte laboros en tiu fabriko. (ĉine)

Pro tio ke en la ĉina lingvo ne ekzistas la tempoj, ĉinoj esprimas la tempojn per adverboj kiel: nun, jam, ĵus, estonte, estinte, estante kaj aliaj adverboj; tial instrui la tempojn al ĉinaj lernantoj de Esperanto estas iom malfacila! Do kiel klarigi la uzadon de tempoj en Esperanto al ĉinaj lernantoj por ke ili bone komprenu ĝian sencon kaj bone regu la uzadon de Esperanto? Mi faris multajn provojn pri tio.

Jen mia instrua metodo: Unue mi foje kaj refoje klarigas al lernantoj ke en E-o, kiel en aliaj multaj fremdaj lingvoj (precipe eŭropaj lingvoj), oni esprimas la diversajn tempojn de la okazo de ago aŭ staton per la ŝanĝoj de la finaĵoj de verboj. Oni uzas la finaĵon -as por esprimi la agon kiu okazas nune; oni uzas la finaĵon -is por esprimi la agon kiu okazis antaŭe; oni uzas la finaĵon -os por esprimi la agon kiu okazos en estonta tempo. Por ĉinoj la verboj ne povas ŝanĝiĝi, ĉar la ĉinaj vortoj estas la ĉina skribosigno, oni ne povas ŝanĝi ĝin, se oni ŝanĝas unu tiron la senco ŝanĝiĝos aŭ tiu ĉina skribosigno estas erara aŭ ne ekzistas. Tio estas la karaktero de la ĉinaj vortoj. Por ĉinoj, por esprimi la diversajn tempojn oni nepre uzas la adverbojn, se ne oni ne povas distingi la sencon de la frazoj. Ekzemple:

Mi legas libron. (Wo **xianzhai** du shu)

Tiu frazo esprimas ke oni legas **nun**. Oni uzas **xianzhai** por esprimi: **nuntempe** mi legas.

Mi **jam** legas libron. (Wo **yijing** du **guo** shu)

Tiu frazo esprimas ke oni **jam** legis libron. Ĉinoj uzas **jam** por esprimi: **pasinttempe** mi legis libron.

Mi **estonte** legos libron. (Wo **jiang yao** du shu)

Tiu frazo esprimas ke oni legos libron. Ĉinoj uzas **estonte** por esprimi: **estonttempe** mi legos libron.

Jen ĉinoj uzas kelkajn adverbojn: **xianzhai, yijing guo, jiangyao,** por esprimi la diversajn tempojn

Por ĉinoj, se oni ne aldonas kelkajn adverbojn en la frazoj, oni ne povas distingi la diferencojn en la frazoj. Ekzemple: En Esperanto ni diras: Mi legas libron, sed en la ĉina lingvo ni diras: Mi **legi** libron. En la frazo de la ĉina lingvo la verbo **legi** neniam ŝanĝiĝas. Se en la frazo ne ekzistas adverbo, oni ne komprenas en kiu tempo tiu ago okazas. Ĉinaj lernantoj jam kutimas delonge tiun strukturon de frazoj, tial en la komenco de la lernado de Esperanto, ili devas pripensi longtempe por kutimi la strukturon de la frazo de Esperanto. Por ke la klarigo estu klara, mi donas al ili multajn ekzemplojn; mi eĉ diras al ili ke en Esperanto, -as egalas adverbon **nune, nuntempe**; -as estas ĉina **xianzhai**, **zhengzhai** ktp... -is egalas adverbon **jam,** -is estas ĉina **yijing**, **wanliao** kaj -os egalas **en estonteco,** -os estas ĉina **jiang yao** ktp...

Nur tiaj klarigoj povas helpi ilin kompreni la uzadon de tempoj en Esperanto. Aŭdinte tiajn klarigojn ĉinaj lernantoj iom post iom ellernas la uzadon de diversaj tempoj de Esperanto.

Kompare kun la simplaj tempoj, la kompleksaj tempoj male estas facile kompreneblaj! Ĉar la kompleksaj tempoj estas faritaj per la nuntempa finaĵo -as de verbo esti kaj la aktivaj aŭ pasivaj participoj de verboj, tio estas:

estas nuntempa participo;
estas pasinta participo;
estas estonta participo;
aŭ estis nuntempa participo;
estis pasinta participo;
estis estonta participo;
aŭ estos nuntempa participo;
estos pasinta participo;
estos estonta participo.

En la ĉina lingvo estas kelkaj adverboj kiuj esprimas la diversajn tempojn. Oni povas pli facile kompreni la frazojn. Mi donas kelkajn ekzemplojn:

Kiam vi eniras en la domon, mi estas leganta (legas) ĵurnalon. (E-e)
Kiam vi eniras en la domon, mi **xianzhai zhengzhai** legas. (ĉine)
Kiam vi eniras en la domon, mi estas leginta (legis) libron. (E-e)
Kiam vi eniras en la domon, mi **xianzhai yijing** legis libron. (ĉine)
Kiam vi eniras en la domon, mi estas legonta (legos) libron. (E-e)
Kiam vi eniras en la domon, mi **xianzhai jiangyao** (legos) libron. (ĉine)

En la ĉina lingvo **xianzhai zhengzhai, xianzhai yijing, xianzhai jiangyao** esprimas respektive tri tempojn. Kun tiuj adverboj, la frazoj estas tre klaraj kaj neniu miskomprenas ilin. Ĉinoj uzas tiajn adverbojn por esprimi diversajn tempojn. Por aliaj tempoj (preterito, futuro), la ĉina havas aliajn adverbojn por esprimi prezencon, preteriton, futuron en la preterito; por esprimi prezencon, preteriton, futuron en la futuro. Ili estas:

Guoqu zhengzhai: estis -anta
Guoqu yijing: estis -inta
Guoqu jiangyao: estis -onta

Jianglai zhengzhai: estos -anta
Jianglai yijing: estos -inta
Jianglai jiangyao: estos -onta

Se oni klarigas la diversajn tempojn de E-o kiel mi klarigas supre, gelernantoj tre klare komprenas kiel bone uzi la tempojn de E-o. La malfacila gramatiko fariĝis tre facila klarigo. Laŭ mia sperto, tiaj klarigoj estas tre facile akcepteblaj por lernantoj. Ili ŝatas la komparon inter du lingvoj. En Ĉinio, gejunuloj plejparte jam lernas eŭropan lingvon, ekzemple la anglan lingvon, sed por tiuj, kiuj neniam lernis eŭropan lingvon, nur tiaj klarigoj estas efikaj en la instruado de E-o. Eble tiaj metodoj estas ankaŭ efikaj por instruado de E-o en la aziaj landoj aŭ en landoj kie oni ne parolas eŭropan lingvon.



LIU Xiaojun,
Shandong Daxue Waiguoyŭueyuan, CN-250100 Jinan, Shandong, Ĉinio, <chinaliu66@hotmail.com>

János Petik:

Pri la instruo de vortoparoj

La instruado de vortoparoj estas unu el la plej tradiciaj kaj plej efikaj metodoj de lingvoinstruado, kies apliko en la instruo de E-o estas samtiel grava, se ne pli grava, kiel/ol en tiu de etnaj lingvoj. Tion ĉi konfirmas la konsidero ke ekz. la prefikso "mal-" prezentas apartan temon en la traktado de la E-a gramatiko, kies instruo estas sendube pli sukcesa, se ni (preferinde jam antaŭ la traktado de la gramatikaĵo mem) kolektigas antinomojn en nia gepatra lingvo (do la etnolingvajn ekvivalentojn de "bona-malbona" k.s.) per niaj disĉiploj.

Da vortopar-tipoj estas ankoraŭ ankaŭ pli. Mi mencias ekz. la partipojn, kies elementoj povas esti "hiponimoj" aŭ "hiperonimoj". Jen unu ekzemplo: "floro" estas hiperonimo al "tulipo", sed hiponimo al "planto". Ĉi-kaze la bazon de pareco konsistigas hierarĥia interrilato, sed da ĉi tiaj bazoj (kaj sekve ankaŭ da vortpartipoj) povas esti ankaŭ pli.

En la jena artikolo mi deziras tuŝi un tian tipon de vortparoj, kies lingvistikajn terminojn mi ne konas, sed kies instruo, laŭ miaj spertoj, povas helpi la klarigon de sencoj de la vortoj konsistigantaj la parojn. Mi arbitre (do ne arogante senerarecon) arigis la vortparojn en 2 grupojn, mi jene prezentas kelkajn el ili laŭ ties grupa aparteno.

I. Subordigaj vortparoj

La vortparojn en ĉi tiu grupo prezentas unuavice verboj, unu el kies paruloj signifas la manieron fari la agon signitan de la alia verbo (alivorte: tion, el kio la alia ago konkrete konsistas). Jen kelkaj ekzemploj:

1. *"ekipi" - "instali"*
Ilustraĵo: "Mi EKIPAS la banĉambron, INSTALANTE bankuvon, akvokranojn k.s. en ĝin." (la "ekipado" konsistas el "instalado").

2. *"kompili" - "kolekti"*
"Mi KOMPILAS poŝtmark-kolekton, KOLEKTANTE poŝtmarkojn en ĝin."

3. *"koni" - scii"*
"Karlon mi KONAS, SCIANTE ke li estas juna, 180 cm-ojn alta, k.t.p." (la difinon de "scii"1 en PV ("koni certe k precize") mi opinias iom miskonduka, ĉar ĝi sugestas, kvazaŭ la sencampleksoj de la du vortoj estus identaj).

II. Kunordigaj vortparoj
Ĉi tien apartenas unuavice adjektivoj, el kiuj unu rilatas tutaĵon, la alia - elementon (la distingigo laŭ grupigo do estas ne tre motivita):

1. *"prava" - "vera"*
"En la konstato de tio XY estas PRAVA, (alivorte:) la konstato estas VERA."

2. *"riĉa" - "abunda"*
"La rivero estas RIĈA je fiŝoj, (alivorte:) fiŝoj estas ABUNDAJ (ABUNDAS) en ĝi."

3. *"akurata" - "preciza"*
"Karlo estas ĉiam AKURATA en la laboro, (alivorte:) liaj laboraĵoj estas ĉiam PRECIZAJ."

Kelkaj el la vortoparoj helpas la distingon de sencoj iom proksimaj unu al la alia (ekz. ĉe "prava" - "vera"), aliaj prilumas sencojn esprimitajn alimaniere en etnaj lingvoj ol en E-o (ekz. "konsulti vortaron/kuraciston" impresas strange al oreloj de hungaroj).

Johano Petik, Hungario

Abonoj Juna amiko 2004:
Tarifo l: 12 EUR. Tarifo 2: 7 EUR.
Aera sendo: +30%. Signifaj rabatoj por kvantoj (ekde 2 ekz.) Perantoj en trideko da landoj akceptas abonojn.
Vizitu: www.junaamiko.inf.hu.

Ĉe la tombo de Komenio

Jan Amos Komensky naskiĝis en 1592 en la iama ĉeĥa regno. Lia dolorplena vivo, dum kiu malgraŭ la suferoj naskiĝis tiom da elstaraj verkoj, finiĝis en 1670 en Amsterdamo.



Komenio publikigis pli ol 150 volumojn ne nur pri didaktiko, eĉ se ni konas lin precipe kiel "Instruiston de nacioj". Li verkis ankaŭ religiajn kaj filozofiajn verkojn, dediĉis sin ankaŭ al kartografio, astronomio, muziko. Liaj plej famaj titoloj estas inter alie "*Janua linguarum reserata*" *(La Pordo de Lingvoj Malfermita), "Didactica Magna" (Granda Didaktiko), "Via Lucis" (La vojo de Lumo), "Orbis Pictus" (Mondoj de Bildoj).*

Li konsciis ankaŭ pri la bezono de universala lingvo. Pri ĝiaj neceso kaj eblecoj skribis en siaj "*Unua Klopodo pri Nova Harmonia Lingvo*" kaj "*Panglotia*", kiujn studis ankaŭ Zamenhof.

La tombo de Komenio troviĝas en la iama valona preĝejeto en Naarden (proksime al Amsterdamo), Nederlando. Al ĝi ligiĝas domo, en kiu estas negranda muzeo pri Komenio. Bedaŭrinde, en ĝi estas nenia spuro pri la estimo de la esperantistaro al la granda pensulo.

La kontaktebloj de la muzeo: *info@comeniusmuseum.nl, www.comeniusmuseum.nl*

Aldona informo: En la nederlanda tagĵurnalo "Rotterdams Dagblad" aperis la 24-an de septembro 2003 la jeno: "La ĉeĥa registaro sendis al Komenio-muzeo en Naarden 80 000 eŭrojn. La loka magistrato minacis fermi ĝin, ĉar ĝi estis tro multekosta."

Rimarko: Ampleksan artikolon pri Komenio sub titolo: *„La ĉeĥa antaŭulo de Zamenhof”* skribis Jeremi Giŝron en "*Israela esperantisto*", dec 2002.

Surfote: La aŭtorino de la teksto ĉe la lasta ripozloko de J.A.Komensky.

Katja Bodnarova, <cind@co.uea.org>

el la landoj kaj sekcioj...

Britio

Verdaj Voĉoj

Kiel vi scias, la brita sekcio nun estas parto de la nacia E-asocio (EAB), kaj tiu aranĝo bonege funkcias. Kunlaborantoj nun abundas kaj iom post iom ni raportos ĉi tie pri niaj novaj projektoj. *Verdaj Voĉoj* estas KD nun preparata de *Paul Gubbins*, kiu enhavos kolekton da 2-minutaj video-filmetoj, montrantaj esperantistojn el diversaj mondo-partoj. Ligota al ĉiu filmeto estos interaktiva ekzercaro – enestos bona gamo – komencanta ekzercaro, du komencintaj, progresantaj kaj eĉ progresintaj. Kiam solviĝos kelkaj teĥnikaj malglataĵoj eblos salti facile inter la ekzercaroj. Sep eroj nun pretas, unu restas kompletigota. La disko celas interalie alkutimiĝi lernantojn al 'tipa' lingvaĵo aŭdata dum internaciaj renkontiĝoj kaj krome celas ankaŭ prezenti diversajn aspektojn de la Esperanta komunumo.

Interesatoj skribu al Paŭlo: <*PGubbins@compuserve.com*>

Angela Tellier, sekciestro
<angela@tellier.co.uk>

Bulgario

Lernejaj kontaktoj serĉataj

Dum tiu ĉi lernojaro en nia lernejo ekfunkciis du fakultativaj E-grupoj (inter 9 kaj 15-jaraĝaj). Ĉu vi scias pri aliaj lernejoj en Eŭropo, en kiuj oni instruas E-on? Mi kaj mia kolegino ŝatus kunlabori kun ili.

Mariana Genĉeva,
<m_gencheva_esp@dir.bg>

Japanio

La 37a Esperanto-Seminario, Ranzan 2004

La Stud-Eduka Fako de JEI (Japana Esperanto-Instituto) okazigos la tutlandan E-seminarion inter la 1-a kaj 3-a de majo 2004. En 2006 ni festos la jarcentan jubileon de japana E-movado, kaj la urbo Jokohamo kandidatiĝas por la UK en 2007. Ĉi tiuj grandaj eventoj instigas nin altigi nian lingvonivelon, precipe parolkapablon. Tial la ĉefa celo de la

seminario estas ke ĉiuj partoprenantoj prenu certan memfidon en interparolo.
Ses klasoj estas preparitaj; de enkonduka ĝis supera. Ni atendas 50-60 partoprenantojn. La urbo Ranzan situas en la gubernio Saitama. De la centro de Tokio oni bezonas ĉirkaŭ unu horon kaj duono per trajno. La seminariejo estas Ŝtata Eduka Halo por Virinoj. Eksterlandaj esperantistoj estas bonvenaj.

ISIKAWA Tieko, sekciestro,
<isksanjo@ff.e-mansion.com>

Togolando

El la jarraporto 2003 de T.I.E.To



Komencantaj kursoj okazis en ĉiuj kluboj de la lando per la Zagreba Metodo. De la 18-a ĝis la 22-a de aŭgusto speciala sesio de surloka kurso okazis en Lome kaj Glidji ankaŭ por progresantoj.
Perkorespondan kurson sekvis 15 lernantoj laŭ la kurso de FEREZ. Unu lernanto finlernis kaj havis sian diplomon.
Ekzamenoj (A, B kaj C) okazis en Lome, Glidji kaj dum la 11-a TEK en Aneho. El la kandidatoj entute sukcesis 7 personoj.

Surfote la estraro (de maldekstre): GBEGLO Koffi (sekretario), ATTIOGBE-AGBEMADON B. Mensah (Prezidanto), DOUMEGON Koffi (vic-sekretario) kaj SAGBADJELOU Kokou (Kasisto).

Reago

En IPR 2003/1 (p. 25.), Rudolf Fischer aludas neregulaĵojn kaj neperfektajn ecojn de Esperanto. Ni, esperantistoj-veteranoj konscias ke tio estas certa. Fakte la lernantoj de Fischer estas inteligentaj, ĉar ili studas lingv(ist)ikon, kaj al ili oni ne povas kaŝi la veron.
Rilate al tiuj kritikindaĵoj oni povas diri ke ekzistas du klasoj:

1) La prezentitaj en la Fundamento;
2) La ekzistantaj en la uzo de la klasikaj verkistoj.

Oni povus "korekti" aŭ plibonigi ilin dumaniere:

a) Per rimedoj ekzistantaj en la Fundamento.
b) Per aldono de novaj radikoj kaj afiksoj.

Tiu lasta povas okazi en scienca kaj teknika lingvaĵo, kiel sekvo de la 15-a regulo de la fundamenta gramatiko.
Kiel ni alfrontas tiun problemon el didaktika vidpunkto? Mi sekvas la metodon de la lernolibro de Miguel Gutiérrez Aduriz, t.e. ni ne tuŝas tiujn dubemajn formojn, almenaŭ por elementaj kursoj. En daŭrigaj kursoj, ni kredas, ke oni devas instrui tiujn malfacilaĵojn por ke la lernantoj komprenu la nunan lingvouzon, sen kaŝi la propran opinion de la instruanto pri la koncerna preferindeco. Se ekzistas intereso pri la menciita temo, bonvolu mesaĝi al mia reta adreso, esprimante vian opinion kaj mi plezure plikonkretigos miajn pensojn.

Felix Garcia Blazquez,Venezuelo,
<felixgarciablazquez@hotmail.com>

37-a ILEI-Konferenco

01-06 aŭgusto 2004, Shashi (Ĉinio)

"Kultura kaj lingva diverseco en edukado"

Ĉu vi ŝatus prelegi dum la 37-a ILEI-Konferenco?

En la urbo Jingzhou (Ĉinio) okazos la 37-a ILEI-Konferenco. Ĝia temo estos 'Kultura kaj lingva diverseco'. Ni invitas la interesitojn prelegi kadre de ĝi rilate al la konferenca temo. La interesitoj povas prezenti sian prelegproponon retpoŝte aŭ papere al la Estrarano pri Konferencoj (adreson vidu en la kovrilpaĝo). La propono enhavu koncizan resumon de la prelego (ĉirkaŭ 150 vortoj maksimume) en Esperanto, koncizan bibliografion kaj personan biografion. Bv aldoni ankaŭ malgrandan foton

por publikigo. Aparte bonvenaj estas aziaj kandidatoj. La sinproponoj estos pristuditaj de la Komisiono nun kreiĝanta tiucele.
Limdato por la kandidatiĝo: *la 31-a de marto 2004*.

Pliaj detaloj pri la Konferenco

Konsiderante la gravecon kaj valorojn de la monda diverseco, ni konferencos ĉi-jare en la urbo Jingzhou (Shashi) por trakti la temon 'Kultura kaj lingva diverseco en edukado'. Bunta programo estas pretigata por la ĉeestantoj kaj ni speciale esperas konatiĝi de pli proksime kun la trajtoj de la E-instruado en Ĉinio kaj en Azio ĝenerale. Ni, interalie, planas okazigi seminarion kunlabore kun la teamo de 'Flugiloj de Malfacila Vento', projekto celanta plivastigi kaj subteni la instruadon de Esperanto.
La konferenca urbo [*surfote vidu ĝian muzeon*] kaj la ĉirkaŭaĵo proponas



allogajn vizitindaĵojn kaj tio aldone al la konata ĉina gastamo, faros de nia Konferenco neforgeseblan sperton. Ni atentigas vin, ke se ni ne kalkulos je sufiĉe da aliĝintoj je la fino marto, ni estos devigataj ŝanĝi la konferencan landon.

Atilio ORELLANA ROJAS

Aliĝilo por la 37-a ILEI-Konferenco
01-06 aŭgusto 2004 – Shashi (Ĉinio)

"Kultura kaj lingva diverseco en edukado"

Konferenca Numero:_____

Ĉu aliĝanto uzu apartan aliĝilon, fotokopion aŭ samformatan paperon.
Bv tajpi aŭ skribi preslitere.

FAMILIA NOMO ..... VIRO/VIRINO
(por alfabeta ordigo) (forstreku unu)
PERSONA(J) NOMO(J) .....
ADRESO (nacilingve en latinaj literoj kun poŝtokodo) .....
.....
LANDO .....TEL Nº (kun prefikso) .....
FAKSO.....RETADRESO .....
PROFESIO/FAKO .....

Mi aliĝas al la Konferenco laŭ la kondiĉoj presitaj sur p. 32-36. de IPR 2003/4 kaj pagas

- £ al la ILEI-Kasisto
- £ al la UEA-konto ilek-a

Mi legis, komprenas kaj akceptas la kondiĉojn de ĉi tiu aliĝilo.

DATO ..... SUBSKRIBO .....

ALIĜKOTIZO (vidu dorse)	.....
..... tranoktoj en ...-lita ĉambro*	.....
Manĝoj**	.....
Ekskurso	.....
KASO "Dazzini"	.....
Koleghelpa KASO	.....
KASO "Erika Lins"	.....
KASO "Interkulturo"	.....
Eldona KASO	.....
DONACO	.....
BANKKOSTOJ	.....
ENTUTE (en eŭroj)	_____

* Mi mendas tranokton ekde la ..... ĝis la ..... en .....-lita ĉambro
* Se vi mendas dulitan ĉambron, bv indiki, kun kiu vi dividas la ĉambron .....
** Mi estas vegetarano: jes ( ), ne ( )
Se vi aliĝas kiel handikapulo, ĉu ILEI jam havas atestilon?
jes/mi kunsendas (forstreku unu)

Rilate al la konferenca temo mi proponas prelegon kun titolo:
.....
(la resumo devas atingi la adreson de la Estrarano pri Konferencoj ĝis la 31-a de marto `04)

Mi proponas la jenan kontribuon al la distra programo:
.....

La kotizoj varias depende de la loĝlando de la aliĝanto, laŭ jena grupiĝo:

A: Ĉiuj landoj escepte de tiuj ĉi-sekve sub B
B: Iamaj socialismaj landoj de orienta Eŭropo; ĉiuj landoj de Azio (escepte de Israelo, Japanio kaj Korea Respubliko), Afriko kaj Latinameriko.

La kotizoj estas pagendaj al la ILEI-Kasisto laŭ jenaj vojoj:

a) al ILEI-konto ĉe UEA: ilek-a, indikante: "ILEI-Konferenco";
b) al nia sveda poŝtĝirkonto Nº 682117-7 nome de ILEI.
SWIFT-kodo: PGSISESS. Por pagoj el ekster Svedio sendu ĝin al IBAN SE2595000099604206821177 kun BIC-kodo NDEASESS. Bv aldoni EUR 6,00 por bankaj kostoj, se vi pagas el ekster Eŭropa Unio.
c) per via banka konto al la antaŭa adreso. Bv aldoni EUR 8,00 por bankaj kostoj.

POR ELEKTI LA ĜUSTAN KOTIZON, BV ATENTE LEGI LA SEKVAJN KLARIGOJN:

Kotizoj en EUR validaj:	ĝis 31.03.04	ĝis 30.06.04	ekde 01.07.04
	1-a periodo	2-a periodo	3-a periodo
Aliĝkategorio	A/B	A/B	A/B
1. Membro de ILEI	30/20	35/25	45/30
2. Ne ILEI-ano	40/25	45/30	55/40
3. Junulo, handikapulo	20/15	30/20	35/25

Organigramo de ILEI

Maketo J. Catil nov. 03

Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj

faka asocio de UEA=Universala Esperanto-Asocio
celas edukadon kaj instruadon

Organiza strukturo :
- Estraro kiu gvidas la strukturon .
- Komitato :
- supera decida instanco en kiu ĉiuj sekcioj estas reprezentitaj.
- 46 landoj = 31 sekcioj kaj 15 reprezentantoj kie ne ekzistas sekcioj.

Organizas :
- ĉiujare konferencon
- seminariojn pri pedagogio

Zorgas pri la elementa kaj meza internaciaj ekzamenoj.

Prizorgas la projekton Interkulturo

Eldonas revuojn :
- IPR=Internacia Pedagogia Revuo organo de la asocio ILEI
- Juna Amiko por bazlernejanoj

Partneroj :
- E@I=Esperanto ĉe Interreto (faka sekcio de TEJO)
- IEI =Internacia Esperanto-Instituto (NL)

Potencialaj estontaj partneroj :
- AIS= Akademio Internacia de la Sciencoj
- ISAE = Internacia Scienca Asocio Esperantista
- Universitataj E-katedroj
- E-centroj kaj edukejoj

Kunlaborantaj Institucioj :
FIPLV=Internacia Federacio de Instruistoj de Vivantaj Lingvoj
UNESKO (en operaciaj rilatoj)

LABORKOMISIONOJ

Ekzamena: Duncan Charters (prez.), Katalin Kováts (vicprez.), Bill Maxey (sekr.), Probal Dasgupta, Gbeglo Koffi, Mireille Grosjean,

Elekta: Maritza Gutierrez (kunvokanto), Ana Montesinos de Gomis, Aurora Bute

Kontrola: Ulla Luin, Bengt Jansson, anstataŭanto: Lars Forsman

Lerneja: Marija Beloševiĉ, Jennifer Bishop, Renato Corsetti, Stefan MacGill, Géza Kurucz, Maŭro La Torre, Raita Pyhälä

Regulara: Rob Moerbeek. **Terminara:** Maŭro La Torre

KUNLABORANTAJ INSTITUCIOJ

E@I (*Esperanto ĉe Interreto, www.ikso.net*), faka sekcio de TEJO (Tutmonda Esperantista Junulara Organizo, *www.tejo.org*, poŝtadreso ĉe UEA)

FIPLV (*Internacia Federacio de Instruistoj de Vivantaj Lingvoj*):
Reprezentanto de ILEI: **Jennifer Bishop** 💻: *esperanto@Education.monash.edu.au*

IEI: *Internacia Esperanto-Instituto,* Riouwstraat 172, NL-2585 HW Den Haag, Nederlando.

UEA: *Universala Esperanto-Asocio,* Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando. *www.uea.org*. A-komitatano el ILEI: **Maŭro La Torre**. Observanto de ILEI ĉe UEA: **Radojica Petrović**. Observanto de UEA ĉe ILEI: **Gbeglo Koffi**.

UNESKO (en operaciaj rilatoj). Reprezentantoj de ILEI: **Renée Triolle**, Bello Bauco, Chemin de la Civade Verde, FR-13600, La Ciotat, Francio; **Jean-Pierre Boulet**, 17 Av. de la Dordogne, FR-63800 Cournon d'Auvergne, Francio, tel. (+33) 4 73 84 90 60; **Mireille Grosjean**, Temple 20 pf. 9, CH-2416 Les Brenets, Svislando, tel.+fakso (+41 32) 932 18 88, 💻: *mireille.grosjean@rpn.ch*

MEMBRIĜO AL ILEI KAJ PAGADO POR ALIAJ SERVOJ

Membreco kostas 18 EUR en A-landoj (laŭ UEA-difino) kaj 9 EUR en B-landoj, kun ricevo de 4 numeroj de IPR jare. Kun aliro nur al reta versio, membreco kostas 4 EUR (A) kaj 2 EUR (B). Bonvenaj estas donacoj al la fondaĵoj de ILEI, konferencaj pagoj kaj abonoj por Juna amiko. Sekciestroj en trideko da landoj akceptas membrigojn kaj donacojn; simile, perantoj por Juna amiko akceptas abonojn enlande. Por pagoj rekte al la internacia ILEI, informu skribe pri la pago al la nova kasisto de ILEI, aŭ komence de 2004 al la provizora kasisto: *Ulla Luin, Myggdalsvägen 123, SE-13542 Tyresö, Svedio.* Retadreso: *ulu@algonet.se*. La pagoj povas okazi pere de konto de ILEI ĉe UEA, aŭ al sveda poŝtĝirkonto.

* Pagoj al konto de ILEI ĉe UEA: Pri pagmanieroj vidu informojn en la Jarlibro de UEA. Atentu pri aldono de sumo por bankkostoj. Indiku vian nomon kaj landon, mallonge la celon de la pago, kaj unu el la tri kontoj ilek-a (generala), juna-l (Juna amiko), pike-b (projekto Interkulturo).

* Pagoj al sveda poŝtĝirkonto: El Svedio pagu al 682117-7. El aliaj landoj pagu al IBAN SE2595000099604206821177 kun BIC-kodo NDEASESS. Aldonu 6 eŭrojn por svedaj bankkostoj se vi pagas el ekster Eŭropa Unio.

* Simpla abono de IPR sen membreco: 18 EUR. Reklamtarifoj por IPR: 180 EUR por plena, 110 EUR por duona kaj 70 por kvarona paĝoj. Tio inkluzivas bazan grafikan pretigon: kostojn de ekstra pretigo oni rajtas fakturi. Sekcioj reklamante edukajn projektojn rajtas peti trionan rabaton.

ILEI estas jure registrita ĉe la Komerca Ĉambro en Den Haag sub numero 27.181.064.

Hejmpaĝo de ILEI ĉe: http://www.ikso.net/ilei/

REDAKCIAJ INFORMOJ

Respondeca eldonanto (verantw. uitgever): R. Wylleman, A. Vermeylenstr. 65, BE-8400 Oostende.
Presado: Flandra Esperanto Ligo, Frankrijklei 140, BE-2000 Antwerpen, Tel: +32-3-234 34 00.
Redaktejo: NÉMETH József, HU-8531 IHÁSZ, Fő u. 41/5. Rete: *http://www.ikso.net/ilei/ipr/; jozefo@mail.globonet.hu*, tel/fakso: +36-89/ 356-050.
Vicredaktorino: *katalin@ikso.net*. La revuo aperas ankaŭ kasete registrita por leghandikapuloj.
Informas: Rob Moerbeek, Zwaansmeerstraat 48, NL-1946 AE Beverwijk.
La nunan numeron ni sendis al la presejo la 23-an de januaro 2004,
redaktofino por la sekva numero: la 15-a de aprilo 2004.

SEKCIESTROJ

Albanio: Vasil Pistoli, c/o Bardhyl Selimi, Rr. Maliq Muco, Pall. 50, ap. 3, AL-Tirana
selimib@albmail.com

Argentino: Teresita Alaníz, El Ombú s/n, AR-5801 Alpa Corral
alaniztomas@arnet.com.ar

Aŭstralio: Penny Vos, 511 Wyndham Lane/Kanoona, Candelo NSW AU-2550
penivos@yahoo.com

Belgio: Raymond Wylleman, A. Vermeylenstr. 65, BE-8400 Oostende
raymond.wylleman@pi.be

Brazilo: Marcos Zlóv Zlotovich, C.P.2641, BR 01060-970 São Paulo-SP
ileibr@linguauniversal.com.br

Britio: Angela Tellier, 10 Marina Gardens, GB IP11 2HW Felixstowe, Suffolk
angela@tellier.co.uk

Ĉeĥio: Jana Melichárková, CZ-696 02 Ratíškovice 938
melicharkova@quick.cz

Ĉinio: Zhang Danchen, General Foreign Languages Dept., 29-34 North Part, Huazhong Normal University, CN-430070 Wuhan
zdchen@public.wh.hb.cn

Finnlando: Carola Antskog, Dragsfjärdvägen 690, FI-25700 Kimito
cantskog@kolumbus.fi

Francio: Joseph Catil, 5, rue des Calabres, FR-69330 Meyzieu,
joseph.catil@wanadoo.fr

Germanio: Michael J. Scherm, Von Thürheimstr. 47, DE-89264 Weissenhorn

Hungario: József Németh, Fő u. 41/5, HU-8531 Ihász
jozefo@mail.globonet.hu

Irano: Hamzeh Ŝafii, P.O. kesto 17765-184, IR-Teheran
ilei.ir@esperanto.org

Italio: Luigia Oberrauch Madella, via Prampolini 8, IT-43100 Parma
silkovojo@aliceposta.it

Japanio: Isikawa Tieko 103, Tate 1-6-6, Siki, Saitama JP-353-0006
isksanjo@ff.e-mansion.com

Katalunio: Luz Vázquez, Apartat 553, ES-43200 Reus
ileicat@hotmail.com

Korea Resp.: CHO Sung Ho, Department of Biology, Inha Universitato, Incheon 402-751, Koreio
shcho@inha.ac.kr

Kroatio/KEL: Marija Jerković, Jarunska 6, HR-10 000 Zagreb
mjerkovic@net.hr

Kroatio/KEU: Ivan Bekavac-Basić, Kuŝlanova 59, HR-10000 Zagreb
ilei_kroatio@teacher.com

Kubo: Pedro Fernández Rodríguez, Requena No. 17 apto. 1 entre S.Allende y Lugareño, Plaza, CU-10600 Ciudad de la Habana
kubesp@enet.cu

Nederlando: Atilio Orellana Rojas, Riouwstraat 172, NL-2585 HW Den Haag,
iei001@tiscali.nl

Norvegio: Björn Thuv, I.F. Gjerdrums vei 33 NO-1396 Billingstad
bthuv@c2i.net

Pollando: Maria Majerczak, ul. Armii Krajowej 7, m. 122, PL-30 150 Krakow, ☎: (+ 48 12) 638 14 49

Rumanio: Mihai Trifoi, Bl. 1/ap.3, Jud. Covasna, RO-527118 Bixad
trifoi@honoris.ro

Rusio: Irina Gončarova, Moloeznaja 38-10, Odincovo 2, Mosk. obl. RU-143000
mirina@online.ru

Svedio: Bertil Andreasson, Södra Rörum pl. 455, SE-24294 Hörby *bertil.andreasson@horby.mail.telia.com*

Svislando: Mirelle Grosjean, Grand-rue 9. Pf. 9, CH-2416 Les Brenets
mireille.grosjean@rpn.ch

Togolando: Attiogbe-Agbemadon B., Mensah, T. I. E. To, B.P. 13169, Lome-TOGO,
esp.togo@cafe.tg

Ukrainio: Nina Daniljuk, prospekt Sobornosti, 32-108, Luck-26, UA-43026

Usono kaj Kanado: Doroteo Holland, 5140 San Lorenzo Dr, Santa Barbara, CA 93111-2521 (US) *dorothyh@west.net*

Venezuelo: Andrés Turrisi, Cen.Res.Puerta del Este.Torre, Oeste, piso15, ap.153, Av.Madrid, VE-1070 La California Norte, Caracas
andesp@internet.ve

REPREZENTANTOJ

Armenio: Lida Elbakjan, Moldovakan 26/2, kv.52, AM-375062 Erevan
LIDELB@freenet.am

Bosnio kaj Hercegovino: Nimeta Kulenović, Branica Sarajeva 15/V, BA-71000 Sarajevo

Ĉilio: Héctor Campos Grez, Casilla 903, CL-3340000 *hecg@uea.org*

Estonio: Helgi Hromova, Pk. 623, EE-12602 Tallinn

Islando: Loftur Melberg Sigurjónsson, Traðarberg 13, IS-221 Hafnarfjörður, *loftur@skyrr.is*

Israelo: Gian Piero Savio, P.O.K.386, IL-84965 Omer
gpsa@uea.org

Kongo DR: Ngangu Nduantoni-Bakidila,B.P.13,CD-Lukala,Bas-Zaïre

Kostariko: Hugo Mora Poltronieri, Apartado 4981, CR-1000 San José
tikoguau@racsa.co.c

Litovio: Algimantas Piliponis, Karolinisiu 3-93, LT-2044 Vilnius
piliponis@centras.lt

Meksiko José de Jesús Corrales C., Belice 116, Fraccionamiento Guadalupe, Durango, Dgo.
jdjcorrales@yahoo.com.mx

Nov-Zelando: Gwenda Sutton, 12C Herbert Gardens, 186 The Terrace, NZ-6001 Wellington 1
gwenda.s@ihug.co.nz

Portugalio: João Jose Santos Rua Damasceno Monteiro, 21-B r/c dto.PT-1170-109 Lisboa
setor_1@hotmail.com

Serbio kaj Montenegro: Radojica Petrović, Bul. oslobodjenja 36, 32000 Čačak *radp@ptt.yu*

Slovenio: Marija Zlatnar-Moe, Miličinskega 66, SI-1000 Ljubljana.
Marija.Zlatnar@guest.arnes.si

Uzbekistano: Eugeno S. Perevertajlo, Abon. jashik 140, Poĉtamt, UZ-700000 Taŝkento, CIS
eugeny@gimli.com